# RAPORTO

**pri la Somera Esperantista Feria/Familia Tendaro 2010**
**33-a S E F T 2010**

La 33a aranĝo okazis de la 24a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2010. Partoprenis pli ol 90 personoj el Nederlando, Koreio kaj Germanio. Ĉifoje ne partoprenis katoj aŭ hundoj, kvankam la tendeja estraro permesas tion. Estis 32 tendoj kaj 5 loĝoĉaroj. 17 partoprenantoj kunhavis biciklon.

La vetero estis iom miksa, komence kaj fine estis suna vetero, sed je la mezaj tagoj iomete pluvis. Sed pro pluva vetero neniu fuĝis hejmen.

Ĉiuvespere okazis la fabelhoro por la infanoj kaj aliaj interesuloj, parte eĉ en Esperanto. Ĉijare estis montrita nur po unu germana fabelo je vespero.

Ĉiutage okazis diversaj migradoj en la ĉirkaŭaĵon. La migrantoj migris piede, boate aŭ bicikle.

Ĉiun posttagmezon okazis ekde la 16a horo nia kafoklaĉo, ofte kun diversaj diskutaj rondoj. Post la kafoklaĉo okazis kurseto por kelkaj interesuloj. Gvidis tion s-ro Werner Pfennig el Neubrandenburg (Meklenburgio-Antaŭpomorio).

Kulmina programero estis la adiaŭa vespero kun tre variaj bongustaĵoj. La 29an de julio estis kuirita supo por la tuta rondo kaj la 28an de julio Klaas el Nederlando bakis kun kelkaj helpantoj bongustajn patkukojn kun diversaj aldonaĵoj, kiel ekz. pomeroj, ŝinko, sekvinberoj, fromaĝo.

La 26an de julio okazis naĝa konkurso kun obstakloj. Kaj la 27an de julio okazis indiaka turniro. La 29an de julio ankaŭ okazis Neptuna festo. Kaj Klaas ofertis diversajn masaĝojn.

Pliaj informoj pri la aranĝo SEFT troveblas en la interreto sub: http://www.esperanto-nb.de/seft/seft_eo.html kaj http://seft.de/. La sekvontjara SEFT (2011) okazos tuj post la UK de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto.

Jen unu novaĵo, pri kiu denove rakontis Reneo dum la aranĝo: ekde junio 2008 ekzistas artikolo pri SEFT en la Esperantolingva vikipedio:

1. http://eo.wikipedia.org/wiki/Somera_Esperanto_Familia/Feria_Tendaro

Krome la SEFTanaro kreskos baldaŭ, ĉar unu el la ĉarmaj SEFTaninoj estas gravedaj.

La tendaro mem havas jenajn adresojn:

**Campingplatz „Am Dreetzsee“, s-ro H.-J. Döhring**
**Thomsdorf 37**
**17268 Boitzenburger Land**
**telefono: (03 98 89) 7 46**
**fakso: (03 98 89) 5 51 06, (03 98 89) 5 03 93**
**reto: www.dreetzseecamping.de**
**Retpoŝto: dreetzseecamping@t-online.de**

René Philipp